Tria jaro. — N° 8 Marto 1913.
sekvanta la Februaran, skribmaŝine faritan aldonon al N° 7.

→ vidu fine de n-ro 1/1910

# FERVOJA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj

| | | |
|---|---|---|
| Jara abono : ₰ 1.<br>Unu N° : ₰ 0,2<br>Anoncoj : 1 paĝo : ₰ 5 ;<br>1/2 paĝo : ₰ 3 ;<br>1/4 paĝo : ₰ 2. | REDAKCIO<br>**S-roj Berlande kaj G. Chilot**<br>Administrantaj Redaktoroj<br>Sekretario : **S-ro Alfred Petzold**<br>Königstrasse, 4 III, Leipzig<br>(Germanujo)<br>(La Prezidanto de la Asocio rajte estas Direktoro de la gazeto). | Ĉiujn manuskriptojn, abonmendojn, anoncojn, k.t.p., adresu al S-ro Berlande aŭ al S-ro George Chilot, ambaŭ en *Villeneuve-St-Georges (Francujo)*.<br>La redakcio rezervas al si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn. — Artikolojn ne akceptitajn oni ne povas resendi. |

## CIRKULERO N° 2

Oficejo kaj sekretario de la I. A. E. F. : S-ro Alfred Petzold, fervoja asistanto, 4 III., Königstrasse, Leipzig (Germanujo).

1. — *Kasaferoj* : Por simpligi la pagmanieron, ni petegas ĉiujn membrojn sendi la kotizaĵojn al S-ro George Chilot, 54, rue de Paris, Villeneuve-St-Georges (Francujo), aŭ al la sekretario, konthavanto de la Ĉekbanko Esperantista de nia Asocio (adreson vidu supre). S-ro Engst (Dresden), malgraŭ tio, estas kasisto ; li havas la kaslibrojn. Jara kotizaĵo kun *senpaga* gazeto estas 1 Sm. 500. *Subtena* kotizaĵo membra (*sen* gazeto) estas 0 Sm. 500 pojare.

2. — *Gazeto :* La « Fervoja Esperantisto » aperos de nun kvarpaĝe, sed ĉiumonate, ĝis kiam ni havos sufiĉe da abonantoj. La plua *presado* de la gazeto postulus tro multe da mono. Estas pli oportune, se ni fortikas la organizon mem, plenumas niajn promesojn kaj ne deficitas.

3. — *Kasstato :* Havaĵo mona je : *a)* 13. VII. 1910 = fr. 27,39 ; *b)* 25. IX. 1912, S-ro Chilot (redaktoro de nia gazeto) akceptis la tutan havajon = fr. 84,64 ; ĉar la *en*spezoj inkluzive nomitaj fr. 27,39 estis ĝis tago de kasakceptado fr. 493.99 kaj la *el*spezoj = fr. 409,35 En la en-elspezoj estas

ankaŭ la kotizaĵoj por la abono de nia gazeto. Unu numero kostis, kun la dissendado (afranko), 60 fr.

4. — *Membraro :* Je fino de la jaro : *a)* 1909 = *63* ; *b)* 1910 = *177* ; *c)* 1911 = *214* membroj ; 1912 ?. Nune *30* kaj 36 abonoj. La membrarliston ni dissendos al tiuj ĉi membroj en plej proksima tempo. La adresaro ne povos esti korekta, ĉar nur malmultaj sendis la demandaron (vidu « F. E. » n-ro 7, paĝo 56). Oni tial sendu korektaĵojn.

5. — *Estraro :* La proponita estraro estas aprobita ; neniu kontraŭbalotis (vidu « F. E. » n-ro 7, paĝo 50, rub. 7).

6. — *U. E. A. :* Por la jaro 1912-1913 ni aliĝis kiel Esperantia Entrepreno sub n-ro 299 (kotizaĵo 3 Sm.) La direktoro de U. E. A. skribas : « Esperanto » volonte akceptos senpage la komunikaĵojn kaj informojn por viaj membroj (duonkolonon po numero). Krom tio, la gazeto akceptus artikolojn pri fervojaj demandoj, kiuj havas ĝeneralan intereson ankaŭ por la publiko.

7. — *Tagordo por Ĉefkunveno :* Proponoj estas petataj.

ALFRED PETZOLD.

## *KARAJ LEGANTOJ*

Ne estu surprizitaj pro tio, ke mi alvenas tiun monaton antaŭ vin, plej bone vestita, ol la pasintan Februaron. Mi surmetis festan eksteraĵon, por ke vi fieriĝu pro mi, kaj mi deziras nepre elvoki simpation vian, esperante, ke vi bonvolos kontentigi jenan deziron mian : tio estas sendi aŭ havigi al mi, kvazaŭ paskajn donacojn, kelkajn aliĝojn al I. A. E. F. kaj abonmendojn. Mi posedos proksimume 32 spesmilojn post pago kaj sendo de l' nuna oka numero.

## KONSIDERU !

Konsiderante, ke la gazeto estas presata en Parizo, en la Centra Presejo Esperantista, kaj ke la presadelspezoj estas pagotaj post livero de l'gazeto, estas nepre necese, ke la abonpagoj estu sendataj al S-ro George Chilot.

# La transportado de malgrandaj komercaĵoj en Granda Britujo

La komercaĵaro, kiun transportas la britaj fervojaj kompanioj, grandparte konsistas el multaj malgrandaj eroj, ĉar la plimulto de la komercistoj, butikistoj, k. t. p. ne havas grandajn magazenojn por konservi iliajn fabrikaĵojn aŭ vendaĵojn, kaj per tiu ĉi mallonga artikolo, mi deziras klarigi al miaj kolegoj alilandaj, kiamaniere oni aranĝas la transportadon.

Ĉar la komercistoj, kaj ankaŭ la maloftaj sendantoj, postulas de la fervojaj entreprenoj baldaŭan liveron de eĉ la plej malgrandaj sendaĵoj, tial la kompanioj sin okupas unue pri la rapideco de la transporto.

La kompanioj, kompreneble, ne konsentas sendi ĉiun malgrandan sendaĵon de la stacio, kie la forsendanto ĝin liveras al ili, al la urbo, kie loĝas la ricevonto, ĉar estas necese, ke la fervojaj ekspluatistoj havu sufiĉe da transporto por rekompenci ilin antaŭ ol ili tiras la vagonojn. Ili starigis pezan minimumon, por kiu ili konsentos vojaĝigi siajn vagonojn, ke se ne ekzistas sufiĉe da pezo, la komercaĵo devas esti sendata al la transŝarĝa stacio. La minimumo diferencas ĉe la diversaj fervojoj, sed ĝenerale estas proksimume 1015 kilogramoj por ordinara komercaĵo kaj malpli por frukto, fiŝaĵo, viando kaj aliaj pereemaj aĵoj. Por faciligi la ekspedon, tial, la administracioj starigis kelkajn staciojn centrajn kaj al tiuj oni sendas la malgrandajn pakaĵojn, por ke oni ilin kunigu kaj forsendu kune al la fino de la vojaĝo. Tiuj ĉi stacioj estas nomitaj « Transŝarĝaj stacioj » kaj ĝenerale ili estas lokitaj ĉe grandaj urboj. Apartenantaj al la pligravaj estas malpligrandaj subtransŝarĝaj stacioj, kiuj funkcias por helpi la rapidan liveron de trafiko en la kamparajn distriktojn.

De la urboj malgrandaj al la transŝarĝaj stacioj, kaj male, veturadas vagonoj, en kiujn oni enmetas pakaĵojn ĉe stacio post stacio, kiuj ne estas sufiĉe pezaj por rajti propran vagonon.

Tiujn ĉi vagonojn oni nomas « vojvagonoj » kaj ili nuligas la malhelpaĵon, kiu alie kontraŭstarus la sendantojn kaj ricevantojn ĉe la urbetoj. Inter la diversaj transŝarĝaj stacioj, oni

lasas veturi ĉiutage rektajn vagonojn sen konsidero pri pezo de la enhavoj, sed plejparte la enhavoj superas la minimumon.

Kvankam ekzistas multaj kompanioj fervojaj en Britujo, tiu ĉi fakto ne malhelpas la rapidan veturadon de malgrandaj sendaĵoj, ĉar la vagonoj de ĉiu kompanio vojaĝas sur la linioj de la aliaj, kaj estas eble sendi vagonojn rekten de la sudo de Anglujo al la nordo de Skotlando; fakte tio ofte okazas.

Ordinare la kompanioj fervojaj kolektas kaj liveras la komercaĵojn de kaj al la komercistoj, k. c. per ĉevalveturiloj aŭ aŭtomobiloj. En la okazo, ke la sendanto aŭ ricevanto mem transportus la sendaĵon al aŭ de la stacio, tiu postulus rabaton de la transportprezo.

W. F. LAWRENCE.

*(Daŭrigota.)*

## *NOVAJ ABONANTOJ*

Tabouret, Ingénieur de la Voie à Troyes

B. Kotzin, Redaktoro de « Ondo de Esperanto », 3 Lubjanskij proezd, kv. 34. Moskva.

Agisson, Villeneuve-St-Georges.

Ignaz Hock, Fervoja Sekretario, Schwandorf (Oberpfaltz, Bayern).


# La Ondo de Esperanto

Monata ilustrata revuo

(fondita en la jaro 1909)

La abonantoj de la j. 1912 jam riceyis SENPAGE romanon de A. Tolstoj : « Princo Serebrjanij », kies prezo por ne-abonantoj estas 1 Sm. 600 afr. Nun ĉiu abonanto de la j. 1913, — krom 12 numeroj de l gazeto, **senpage** ricevos **donace** belan Esper. libron :

**« ORIENTA ALMANAKO »**

**el la lingvoj japana, ĉina, araba, hinda, sanskrita, persa, armena, kartvela ktp.**

La « Ondo » aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro havas 16—24 paĝojn. Formato 17 × 26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda (poŝtk. ilustr.).

***Anonco en « Koresp. Fako » — 3 respondkuponoj.***

La abonpagon (2 rubl. = 2 Sm. 120) oni sendu al « Librejo Esperanto », 26, Tverskaja, Moskva, aŭ al « Presa Esperantista Societo », 33, rue Lacépède, Paris (kiu vendas ankaŭ po numero, 15 Sd., afrankite 20 Sd.) poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpagilo de Esper. ĉekbanko.


Centra Presejo Esperantista, V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.

*Le gérant :* A. BERLANDE.